

KOMENCANTO

gazeto por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj



Bill Thorne
[LONDONO, Britio]

2001

kiel redaktoro de KOMENCANTO iĝis esperantisto — literatur-
historiaj paĝoj — rakonto — enigmoj — rimaro — aforismoj —
anekdotoj — anoncetoj — informoj — korespondu!

7

Perantoj de KOMENCANTO

ĉe tiuj adresoj vi povas aboni nian gazeton

Argentino Argentina Esperanto-Ligo, Casilla de Correo 2910 - Correo Central, AR-1000 Buenos Aires.

Aŭstralio Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

Belgio Flandra Esperanto Ligo Frankrijklei 140, BE-2000, Antwerpen

Brazilo Brazila Esperanto-Ligo, Caixa Postal 03625, Brasília (DF) - BR - 70084-970

Britio Esperanto-Asocio de Britio, Wedgwood Memorial College, Barlaston, Stoke-on-Trent, ST12 9DG.

Ĉeĥio Vladislav Hasala, A.Dvoráka 1, CZ-696 62 Strážnice

Danio Revuservo de Dana Esperanto-Asocio Frederik Eriksen, Finsensgade 10, DK-4800, Nykobing F.

Estonio Virve Ernits, Mahla 65 — 1, EE — 0012, Tallinn

Finnlando Heta Kesälä, Kalamiehenkuja 3 D 32, FI-04300, Tuusula

Franco ~ Unuiĝo Franca por Esperanto, 4 bis, rue de la Cerisaie, 75004, Paris.

~ R.Melo, 34, Av. de Russie, FR-03700, Bellerive S/A

Germanio Dr. Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Strasse, 9 D-55129 Mainz.

Irano Irana Esperanto-Centro, P.O.Kesto 17765-184, TEHRAN

Italio Itala Esperanto Federacio, Via Villorosi, 38, 20143, Milano.

Italio, Kroatio, Slovenio

Višnja Brankovič, Via Leghissa 6, IT-34131 Trieste

Katalunio Kataluna Esperanto-Asocio, Apartat 290, ES-08200, Sabadell

Kubo Lazaro Azcuy Ravelo, str. 25 #5611 c/56460 Playa 11300, HAVANO

Litovio Litova Esperanto-Asocio, LT-3000, Kaunas, ab.k. 167.

Norvegio Norvega Esperantista Ligo, Olaf Schous vei 18, N-0572 OSLO

Pollando Maciej Wnuk, Skrytka 105, ul. Broniewskiego 77-137, PL-01-865 Warszawa

Svedio SEF, Lisbet Andréasson, Södra Rörum pl 455, SE — 24294 Hörby

Svislando Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH — 4224 Nenzlingen

Usono

Esperanto Ligo por Norda Ameriko, P.O.Box 1129, El Cerrito, California 94530, U.S.A.

redakcie

Karaj legantoj!

Vi tenas en la manoj la lastan 12-paĝan kajeron de nia gazeto.

Jam la sekva, oka numero de K-2001 havos 16 paĝojn kaj koloran kovrilon, ĝi aspektos tiel, kiel aspektos KOMENCANTO ekde 2002 jaro.

Sed dume ni kutime priskribas ĉi-numeron. Sur la kovrilo — aŭtuna fantazio de Bill Thorne.

Sur la najbara paĝo, en la rubriko "Kiel tio komenciĝis", responde al la petoj de la legantoj, mi rakontas pri mia esperantistiĝo.

Ĉe la literatur-historiaj paĝoj vi povos konatiĝi kun du estonaj poetoj, iliaj vivoj kaj verkoj.

Poste vi povos legi originalan noveleton de N.Popov, Ruslando, lirikajn poemojn de Santi Elena Bullo, Italio kaj filozofan verseton de Yonier Cables Solis, Kubo.

Sur la distraj paĝoj vi trovos gajan rakonton de Igorj Belousov "Eksedziĝo" kaj vorteniĝmon. RIMARO de Bill Thorne daŭre trejnados poeziajn kapablojn de la legantoj.

Aforismoj, Anekdotoj, Anoncetoj tradicie finas la kajeron.

Mi deziras al vi ĉion bonan kaj agrablan legadon!

Abonu KOMENCANTO'n por 2002 jaro!

DANKON al *Bill Thorne* pro 10 pundoj
donace al KOMENCANTO!

KOMENCANTO

2001 numero 7 // 8 numeroj jare
regule aperas ekde 1997

redaktas kaj eldonas: Viktor Kudrjavcev
konstanta kunlaboranto: Rafija Jafasova
adreso:

620041, Ekaterinburg, ab. ja. 132, Ruslando

retpoŝto : let@epost.uralpost.ru

abontarifo por 2002:

internacia tarifo: 15 eŭroj aŭ \$15;

orienteŭropa kaj latinamerika tarifo : \$13;

aŭ por ĉiuj — 16 IRK

konto ĉe UEA: vkud-a

ruslanda tarifo: 100 rublej (za 6 nomerov v god) prostym poĉtovym perevodom na imja Kudrjavceva Viktora Vasильевичa: 620041, Екатеринбург, а. я. 132

Oni rajtas uzi bildojn kaj verkojn el "K"

La sola kondiĉo - nepre menci KOMENCANTO'n, la nomojn de la aŭtoroj kaj ties loĝlokojn.


Kiel tio komenciĝis *Viktor Kudrjavcev* redaktoro de KOMENCANTO

— gazeto por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj

Esperanto ege riĉigis mian vivon

Multaj legantoj petas min rakonti pri mia esperantistiĝo. Mi volonte faras tion laŭ via bonvolo ĉi tie, sur la paĝo de nia konstanta rubriko "Kiel tio komenciĝis".

via *Viktor Kudrjavcev*



Mia unua scio pri Esperanto estis negativa: infanaĝe mi legis en unu libro, ke tio estas "mortnaskita lingvo, destinita al fiasko".

En 1975 mi studentiĝis en Ĉelabinska Politeknika Instituto, Urala regiono. Mi frekventis la urban bibliotekon pri fremdaj lingvoj por memstare okupiĝi pri la angla — eterna modo de ĉiuj studentoj. Foje, dum januaraj ferioj 1976 venis en la salonon homoj, ili anoncis, ke tuj okazos prelego pri Esperanto. Mi restis aŭskulti. La rakonto tiom interesiĝis min, ke mi decidis nepre ellerni Esperanton, tiom facilan lingvon...

Rilato de miaj kolegoj-studentoj al la afero okazis skeptika, ili ne komprenis mian entuziasmon. Kaj fakte dum la vivo neniu el kolegoj, kun kiuj mi laboris aŭ oficis ne ekokupiĝis pri Esperanto, kvankam la rilato al ĝi estis plejparte bona.

La lingvo tuj ekplaĉis al mi, ĝi estis kvazaŭ facila rebuso, kie oni povas montri lertecon de sia intelekto. Mi plezure vizitis lecionojn.

Post fino de la elementa kurso niaj geklubanoj proponis al mi somere 1976 viziti SEJTon — Sovetian Esperantan Junularan Tendaron apud Tifvin, Leningrada

regiono. Ili promesis puran aeron kaj pure esperantistan atmosferon. Mi estis juna, 18-jara, min logis malproksimaj lokoj. Do, mi ne povis rifuzi, kvankam hezitis pri mia lingvoscio.

La tendaro situis tute flanke de "civilizacio", en pitoreska arbaro kaj preskaŭ sovaĝa naturo. Venis 300 personoj el la tuta Sovetunio. Rezentantoj de la tuta lando loĝis en tendoj sur la sama arbara kampeto. Interesa programo, interplektita kun aromo de juneco kaj bonodoroj de naturo. Rezulte mi ricevis la plenan korbon de pozitivaj impresoj, kiuj instigis min al la aktiva agado. Reveninte el la tendaro mi tuj organizis kurson. Kiom kuraĝa kaj tromemfida estas juneco! Mi ne povis flue paroli, mi eĉ ne parkeris ĉiujn regulojn! Tial la sorto decidis min ekzameni — kun mia grupo ni vizitis regionan E-renkontiĝon, kie dum la solena malfermo la organizantoj neatendite invitis min al la mikrofono por salutparolo.

Tiuj dudek paŝoj estis por mi kvazaŭ paŝoj al la eŝafodo! En mia cerbo fulmis: "Post kelkaj sekundoj miaj gelnantoj ekvidos, ke ilia instruisto ne scias flue paroli! Terure!!" Eble pro tia nervostreĉo okazis tute male — mi prenis mikrofonon kaj improvizis longan kaj tute fluan salutparoladon, ke oni eĉ aplaudis.

Tiel komenciĝis mia esperantista vivo. Mi partoprenis ĉiujn regionajn renkontiĝojn, iĝis prezidanto de la klubo, mem organizis E-aranĝojn, komencis internacian korespondadon...

Al miaj unuaj 40 leteroj reeĥis nur 5 personoj, sed kun unu el ili, mia amiko Ralf Jalming el Goteborgo, Svedio, ni korespondas jam dum 25 jaroj!

Aparta elemento de mia agado estis organizo de korespondanta kurso. Mi publikigis cen-

tojn da artikoloj pri Esperanto en centra, regiona kaj distrikta gazetaro tra la tuta lando, rezulte de tiuj publikaĵoj multaj centoj da korespondaj kursanoj komencis lerni la lingvon. La kurso funkcias seninterrompe jam preskaŭ 15 jarojn!

Mia unua eksterlanda vojaĝo ankaŭ estis ligita kun Esperanto. En 1987, kiam okazis 100-jara jubileo de nia lingvo, mi partoprenis kongreson de TEJO (Tutmonda Esperanta Junulara Organizo) en Krakovo, Pollando. Min impresis la fakto, ke 1000 partoprenantoj el 50(!) landoj tute libere interparolis kaj komprenis unu la alian sen tradukistoj! Dum la tuta kongreso ni preskaŭ ne dormis, kaptis la okazajn konatiĝoj kun kiel eble pli multaj esperantistoj, kun kelkaj ni amikas ĝis nun, inter ili Jak Le Puil, redaktoro de "La KancerKliniko" (vidu "K"-5).

Poste sekvis aliaj internaciaj aranĝoj, — kongreso de SAT en Linc, Aŭstrio, 1990. UK-83 en belega, suna, mediteranea urbo Montpeliero, Francio 1998.

Ĉiuj E-renkontiĝoj, kongresoj, vojaĝoj, internacia korespondado, kontaktoj kun multaj interesaj personoj ege riĉigis mian vivon kaj pruvis, ke Esperanto tute ne estas "mortnaskita lingvo, destinita al fiasko". Male, ĝi estas tre vivanta lingvo, kapabla larĝigi vivajn ĥorizontojn de ĉiu esperantisto.

Do, vere Esperanto estas por mi la tuta mondo. Mi mem ĝuas fruktojn de nia lingvo kaj regalas per tiuj fruktoj ĉiujn dezirantojn. Ĝuste por tio mi gvidas korespondan kunson kaj eldonas KOMENCANTON.

Sed KOMENCANTO estas jam tute aparta rakonto, se vi volas...

Ĝi nun multaj bondezirantoj
V. Kudrjavcev

La 2-a periodo de esperanta literaturo

La estonaj aŭtoroj

Ĉi-numere sur paĝoj de nia konstanta literatur-historia rubriko ni prezentas al vi, karaj legantoj, du estonajn poetojn, kiuj estis literature aktivaj ankaŭ dum la dua periodo de E-literaturo. La plej konata verkistino el tiel nomata estona skolo estis Hilda Drezen.

Hilda Drezen

(pseŭdonimo Higo) — estona radiotelegrafistino. Naskiĝis 11 majo 1896 en Kolga; esperantistino de 1913. Dum kelkaj jaroj ŝi estis sekretario de la Estona Esperanta Socio. Ŝi komencis traduki en 1922. Krom la estona, H. Drezen tradukis ankaŭ el la germana, rusa, liva. Ŝiajn verstradukojn karakterizas riĉa rimtrova sento, vivanteco de la lingvo, aparta ĉarmo de la esprimmaniero. Kun inspira simpatio ŝi tradukis kolekton el Marie Under "Elektitaj versaĵoj" en 1929 kaj poemojn el J.Barbarus "Horizontoj" en 1931. En la sama 1931 jaro aperis ŝia kuntraduko de "Estonaj kantoj".

H. Drezen kunlaboris ankaŭ en la "Estona antologio" (1931) kaj en la "Svisa Antologio" (germanan poezian parton, 1932).

Multaj originalaj kaj tardukitaj poemoj de H. Drezen aperis en la revuoj: "Luitertura Mondo", "Norda Prismo", "La Nica Literatura Revuo". Unu el la plej sukcesaj ŝiaj tardukoj estis sendube la elstara traduko de la estona nacia epopeo "Kalevipoeg", el kiu jam en 1975 en Tallinn ĉe eldonejo "Eesti Raamat" aperis fragmentoj kun ampleksa enkondukita studo.

Verkado de H. Drezen disvastiĝas ankaŭ al la tria periodo de E-literaturo. Ŝia originala poemaro aperas en 1967 sub titolo "Norda Naturo" Tiun originalan poezion distingas la lingvo eĉ pli elasta kaj harmonia, ol en la tradukoj, kie kelkfoje sentiĝas ia stila rigideco, la lingva malflekseblo. En tiuj originalaj poemoj regas ia milda melankolio, kiun tre bele kaj poetike karakterizis K. Kalocsáy: "... ĝi similas al la nuba ĉielo, tra kiu oni esperas, volas lumon. Tiu lumespero donas tute apartan nuancridon eĉ al la grizo kaj en kelkaj ŝiaj printempaĵoj ĝi tremas en la ĝojo de plenumiĝo".

Ĉi tie vi povas legi kaj ĝui originalan version kaj tradukon de Hilda Drezen.

VINTRA LUNO

La plenlumaj vintronoktoj estas nedireble belaj.
Froste bluas kaj argentas neĝo sub la luna bril'.
Al ĉiel' en muta preĝo sin etendas la malhelaj
nudaj branĉoj de pomarboj, dormetantaj en trankvil'

Kaj sopiroj argenteccaj tra la koro milde glitas,
similantaj al survitra delikata frostoflor',
kaj de la fenestro rava nun foriri mi hezitas
malgraŭ tempo enlitiĝa, malgrau la malfrua hor'.

En la ĉambro, kien falas luna brilo tra l' kurtenoj,
kuŝas en timiga, prema senviveco la meblar',
riproĉete alrigardi ŝajnas la kanapkusenoj,
por fantoma ludo glitas la lunlum' laŭ la klavar'.

Jen, la luno tute male nun efikas al animo:
la lunbrilo froste morta ŝajnas plena de danĝer'.
Inter la senvivaj mebloj kaptas min subita timo:
malgraŭ la lunlumo kvazaŭ kuŝus mi sub nigra ter'.
(1931)





Vinnikova Nina [N.A.L.T.A.I.S.K., Ruslando]

Henrik Visnapuu:
traduko de Hilda Drezen

ORFLAVA KANTO

Orflava estas park^o, orflava estas koro.
Du paŝoj en pereo ora.
Orflava estas voj^o, orflava estas koro,
Jen paro en pereo ora.
Jen paro en parolo ora,
La koro estas flava, oraŭtuna.
Du paŝoj dum parolo ora,
Du koroj en parolo oraŭtuna.

Parolas koroj du en ora sonĝo,
Diverse ambaŭ tiuj koroj flavas.
Jen mia kor' en sia ora sonĝo.
La via, jen alikolore flavas.

Orflava estas park^o, faladas orfolioj,
Orpapilioj glitas teren,
Orflava estas voj^o, faladas orfolioj
Sur vojon. Ĉu maldekstren nun aŭ dekstren?
(1923)

Al la estona skolo oni povas kalkuli ankaŭ la poeton kaj verkiston Hendrik Adamson.

Hendrik Adamson

estis estona popollerneja instruisto. Li naskiĝis 24 sept. 1891, fariĝis esperantisto ĉirkaŭ la jaro 1930. H. Adamson multe verkis en la estona lingvo, ekde 1932 li verkas poemojn ankaŭ en Esperanto.

Liaj poemoj plejparte aperis en revuo "Literatura Mondo", en 1934 en poemkolekto "Dekdu poetoj", redaktita de K. Kalocsay. En 1934 ankaŭ estis eldonitaj liaj noveloj sub titolo "Auli".

En poezio de H. Adamson regas amara ironio aŭ intime elegia humoro, granda reaga sentemo al la vivrealaĵo, kiu vere ne dorlotis lin: malsana, li dum longaj jaroj vivis kaj mortadis en mizero. Post 21 jaroj de lia morto, en 1967, sub titolo "Vesperkanto" aperis poemaro de li, kiu restis lia konsiderinda poezia testamento.

Hendrik Adamson

VESPERKANTO

Forpasis kure la juneco —
temp^o tro revema sen prudent^o —
kaj estingiĝis purpurmeĉo
en malproksima orient^o.

Min tro lacigis voj^o ŝtonoza,
sur dorso de zorgegoj ĝib^o —
antaŭen iras senripoze
mi sub la sortobata vip^o.

Atendas min jam sub plataĵo
de tomo ĝi, malvarma lit^o,
volviĝas sole el kreskaĵoj
de tero ĉirkaŭ kruco vit^o.
(1932)

poemo

Originale verkis kaj esperantigis **Popov Nikolao** [MIĈURINSK, Ruslando]

Espero

Neĝo, neĝo estas sur la tuta blanka mondo. Frida fantomo kaŝe iras tra la stratoj de la urbo, tuŝante per malvarma mano la maldikajn kolojn de preterpasantoj, de homoj, perdintaj esperon por pli bona vivo, perdintaj esperon por sia sukcesa sorto.

Espero. La ĉarma bona espero, kie vi estas? Kial vi foriras nerigardante, ne interkoinprenite, kial vi forlasas nin, malaperante en malhelo? Kion do ni faru? Al kio ni fidu kaj kiun amu? Sed ĉu oni povas fidi kaj ami, perdinte la esperon? Ĉu oni povas fidi al espero kaj esperi pri fido?

Per glata tavolo kuŝiĝas neĝo sur tegmentojn de domoj
Okuloj sen espero post diafana vitro. La rigardo tuŝas la teron, klopodante ekvidi la padon, sur kiu iradis ies piedoj. Silento. Estas stranga silento ĉirkaŭe. Ne videblas okuloj. Ne troveblas la pado sub neĝo — ne estas spuroj. Blanka-blanka neĝo, pura frosta aero.

De fora pasinteco ekaperas alarmaj sonoj. La kanto. Ĉiam pli kaj pli laŭta. Plikreskas impresa melodio, plenigas la straton. Trumpetanta voĉo kuregas super la tero... kaj malaperas momente.

Ne estas pli da fortoj sidi apud la fenestro. For, for de malluma angulo! Large malfermita pordo. Kie estas la homoj? La vento puŝiĝas bruston, per neĝuragano blindigas okulojn. Oni devas iri. La vento kolektas la fortojn, vipas ĉe la kolumo, ĵetas sin diversloken, ĵetiĝas sur la neĝon. Sed kion ĝi kapablas, tiu ĉi vento?! Eble ĝi aldonos obstinon?. Blovu la vento multpovz. De ĝi nur venas inspiro, konvinko kaj espero.

Sadretdinova Naila [VORONEĜ, Ruslando]



Santi Elena Bullo
[MESTRE, Italio]

En la vagonaro

Dum vagonaro
rapide kraktinas,
via koro kun ĝi
dolĉe veturas.
Vi sidas komforte
en la bela kupeo
sola, kun vi mem
trankvile v' aŭdas
la taktaĝon de la reloĵ.
Ĉu al mi ankoraŭ
vi pensas aŭ ne?
Arbojn, arbetojn,
brikajn domojn,
veturante vi vidas;
ĉiuj pasas sen paŭze
antaŭe viaj okuloj.
Taktas via koro
kun la takto
de la brilaj reloĵ.
Ĉu al mi ankoraŭ
vi pensas aŭ ne?

Sadretdinova Nalla [VORONEJ, Ruslando]



Sendis al la redakcio
Yonier Cablea Solle,
[HOLGUIN, Kubo]

Ĝoju pri etaj aĵoj!
Per tiu ĉi ŝlosilo
vi ĉiam kaj ĉie
iom feliĉos.



Belousov Igorj
[MARKS, Ruslando]

Eksedziĝo

Mi ekploris kaj petis eksedziĝon.
Li faris movon per oreloj kaj diris, ke en la vivo
ne renkontadis pli grandan stultulinon, ol mi.
Mi diris, ke li mem estas stultulo, se edziĝis je mi.
Li respondis, ke li plene konsentas.
Mi ekploregis kaj petis eksedziĝon insiste.
Li ekkriis, ke al li tedis miaj kapricoj.
— Kraĉi mi volas al tio, - respondis mi
Li ordonis kuiri por li kafon.
Kiam mi kuiris la kafon, li telefonis al lia amatino.
Mi donis al li la kafon kaj tranĉadis tunon da brasikoj.
Dum la tempo, kiam mi pri tio okupiĝis, li babiladis kun
la amatino.



Ŝulepov Aleksandr [VERHOTURJE, Ruslando]



Mi lavis liajn botetojn.
Li ŝlosis en la kaĝo mian papagon.
Mi kuiris la vespermanĝon.
Li mergiĝis en Interreton.
Mi iris lavi alies lipruĝon de lia ĉemizo.
Li kaptis min je tio ĉi okupo, unue tikladis min ĝis
histerio, kaj poste kisadis ĝis ekstazo.
Post tio li ankoraŭfoje telefonis al la amatino kaj
interkonsentis kun ŝi por alia tempo.
Li detale studis ĉiujn gazetojn kaj anoncis al mi, ke li
volas manĝi.
Ni vespermanĝis. Mi lavis la telerojn. Li fumis.
Mi gladis lian ĉemizon kaj eksidis por legi.
Li faris movon per oreloj kaj anoncis, ke neniam
eksedziĝos kun mi.
"Certe, - mi pensis, - duan tian stultulinon vi jam ne
renkontos!"

Ŝulepov Aleksandr [VERHOTURJE, Ruslando]

Legomo, frukto kaj bero estas bona afero!

Bonvolu trovi en la literkaoso 12 nomojn de la manĝeblaj plantoj. La vortoj ne
kruĉiĝas inter si kaj etendiĝas en ajnajn direktojn. Vidu ekzemplon [pri oranĝo]

t	b	r	a	s	i	b	p	i	o	r	c	i	t	r	o
e	r	k	u	k	e	o	z	n	a	c	e	p	o	n	
a	p	o	m	u	o	r	p	i	ĝ	o	o	z	u	n	o
j	l	o	o	m	o	o	r	ĉ	e	r	i	k	s	o	




Respondoj de la enignoj el la 6-a "K": **Krucenigmo de Bill Thorne**, horizontale: 1-facila, 4-ansero, 5-areo, 6-ofer', 7-tro, 9-anso, 10-ene, 11-stivis, 12-kamo, 13-melono; vertikale: 1-farata, 2-infero, 3-apro, 6-oste, 8-ero, 9-animal', 10-eta, 11-skem', 14-nevo, 15-obsedo.
Rondenigmo de Katja Nosova: 1-mono, 2-nombro, 3-broso, 4-roso, 5-somero, 6-erozio, 7-iono, 8-nokto, 9-tondro, 10-romano, 11-nomo.
Enigmo de Elena Koneva: supre: E-E-E-E, meze-GRAMATIKO, malsupre-ESTAS.

Gratulojn al s-ro **David Thornell**, [LONDONO, Britio] kiu sendis al ni plene korektajn respondojn!

Zujeva Margarita
[MOSKVO, Ruslando]

Responde al RIMARO:

ADMIRALO kaj GENERALO




Perevalov Jurij [LESNOJ, Ruslando]

Foje maljuna admiralo en analo tralegis pri konata generalo. Ili renkontiĝis ĉe la tablo en restoracio; medaloj kaj ordenoj respreguliĝis en pokaloj. Ili ofte batalis apude, tial memorigis al si multajn eventualojn de vivo, ekzemple malfacilan batalon por elektra centralo trans kanalo, ili memorigis al si detalojn de batalo kaj ĝian finalon. Ĉi tio estis la batalo por la vivo.

Sed iam en juneco ili estis ankaŭ kiel rivaloj, sed sen skandaloj, kiam en unu malproksima lando ambaŭ samtempe ekvidis en valo belegan rajdantaron. Sur junulino estis multekostaj ŝalo kaj vualo, selo de ĉevalo estis ornamita per opaloj, metaloj kaj kristaloj.

Ili rulis, repuŝante unu de la alia, ĉiu volas esti unua apud belulino. Sed ŝi ekridis, skurgis ĉevalon kaj forgalopis. Ili ekkoleris, disveturis unuope kaj ne parolis dum unu semajno.



Kornjuĥina Anna S. [SUZUN, Ruslando]

Belousov
Igorj
[MARKS,
Ruslando]

*miaj provoj helpe de la
RIMARO de B. Thorne*

*Ĉu generaloj
sen medaloj?*

*

*Ano estas
bela oznamo
(de la vivo)*

ABO

Tie estas roka kabo,
Sur la kabo staras stabo,
Ĉe la stabo kuŝas trabo,
Sur la trabo ludas knabo

Bill Thorne
RIMARO

ACO
donaco
graco
grimaco
maco
minaco
paco
pajaco
palaco
placo
spaco

AĈO
apaĉo
kaĉo
klaĉo
maĉo
plaĉo
vaĉo

APO
drapo
eskapo
etapo
handikapo
kapo
klapo
mapo
napo
papo
rapo

AŜO
kraŝo
paŝo



Aforismo estas frato de anekdoto, amiko de paradokso kaj filo de saĝeco {N.Neksin}

AFORISMOJ

*Sparu tempon -
legu aforismojn!*

{Jurij Bazilev}

Aforismoj similas al advokatoj, kiuj vidas nur unu flankon de la afero.

{Antoni Bergas}

Estanteco de la literaturo estas en aforismo — oni ne povas produkti el aforismo kinofilmon.

{G.Laub}

Eldiroj — ordinaraj vortoj de neordinaraj personoj.

{NN}

Ajna aforismo similas al nukso - ekstere bona, ene - je tri kvaronoj malplena.

{F.Vandran}

Ĉu vi rimarkis, ke ni multe pli atentis al la saĝa penso, kiam oni ĝin citas, ol kiam ni renkontas tiun personon ĉe la aŭtoro mem?

{F.Hamerton}

Alimaniere metitaj vortoj esprimas alian sencan, alimaniere metitaj pensoj faras alian impreson.

{B.Paskal}

Kiam oni legas antikvajn saĝulojn, ofte renkontas ion sian, ĉu ne?

{B.Volter}

Zujeva Margarita

{MOSKVO, Ruslando}

Se homo estas juna, bela, riĉa kaj estimata, por prijugi lian feliĉon necesas tamen scii, ĉu gaja li estas? Sed se li gajas, tiam indiferentas, ĉu li estas maljuna aŭ juna, rekta aŭ ĝiba, riĉa aŭ malriĉa — li gajas! Nur gajeco — disponebla monero de feliĉo, ĉio cetera — nur kreditaj biletoj.

{Ŝopengauer}

Songŝo estas balzamo de naturo.

{Ŝekspiro}

Kiu al si severas, tiu bone prosperas.


{proverbo}

Pli bonas esti objekto de envio ol kompatato.

Perdo de amikoj — estas tiu imposto, kiun pagas longevivantoj.

{Gonatan Swift}

Bill Thorne
{LONDONO, Britio}



Ne konkurenci estas la esenco de amikeco.


Gansen, V.V. kaj O.V.

{Kareljo, Ruslando}

La varma rideto estas universala lingvo de bonkoreco.

Ĉiuj animaloj, krom homoj, scias, ke la ĉefa devo de la vivo estas ricevi plezuron de ĝi.

Agrablas esti grava, sed pli gravas esti agrabla.



Martin Ginette {SAULHURES/MOSELOTTE, Francio}



*Kolektis el hungarlingva ĵurnalo
kaj esperantigis:*

Zoldoŝ Rudolf
[KANJIZA, Jugoslavio]

Se homoj vivus nur kiam iliaj cerboj funkcias, - tiam jam nun multajn homojn oni devus entombigi.

✱

— Diru, kial vi permesas al via edzino ludi sur klaviro? - Ja ŝi absolute sentalentas!

— Vi tute pravas, sed kiam ŝi ludas klaviron, ŝi almenaŭ ne krias!

✱

En spegulo:

Du policanoj sidas en drinkejo. Tie sur la muro pendas granda spegulo. Unu el la policanoj diras al sia kolego:

— Jen, rigardu, en tiu flanko de la drinkejo sidas du niaj kolegoj... Ni iru ilin saluti. Kaj... jen unu el ili ekstaris por iri.

— Ni atendu, - diras la alia, - jen ili ankaŭ volas viziti ian tablon.

Gansen V.V. kaj O.V.
[Karelio, Ruslando]

Edzino al la edzo:

— Iru aĉeti panon.

— Sed sur la strato estas tia pluvego! La bona majstro eĉ hundon ne elpelos promeni en tia vetero!

— Mi ja ne petas vin preni kun vi la hundon.

Belousov Igorj
[MARKS, Ruslando]


Anonco en geedziĝrubriko:

“Juna agrikulturisto kun malnova kaj rompita traktoro serĉas fianĉinon kun nova traktoro por geedziĝi. Sendu leterojn kun foto de... l' traktoro.”

✱

Profunda sonĝo estas malgranda morto, sed la morto estas senfina sonĝo.

✱ ✱ ✱



Kornjuĥina Anna

Tradukis kaj pentris [SUZUN, Ruslando]

— Frap-frap!!!

— Kiu estas tie?

— Sed kiu tie estas?

**Zujeva
Margarita**
[MOSKVO,
Ruslando]



— Sinjoro kuracisto, mi havas depresion.

— La plej bona kuracilo — mergiĝi en laboron.

— Sed mi knedas betonon!

✱

— Sinjoro kuracisto, mi konstante aŭdas voĉojn.

— Kaj kion ili al vi diras?

— Mi ne komprenas, ĉar mi surdetas.

— Sinjoro kuracisto, mi kiel antaŭe suferas pro sendormeco.

— Mi rekomendas al vi antaŭ dormo abunde vespermanĝi.

— Sed ĝuste antaŭ unu jaro vi malpermesis al mi manĝi antaŭ nokto.

— Kion vi volas? Dum tiu jaro medicino multe progresis.

✱

Kuracisto:

— Kara mia, mi malpermesas al vi drinki, fumi, seksumi, viziti kazino...n...

— Evidente, sinjoro kuracisto, vin jam vizitis mia edzino.



Šulepov Aleksandr [VERĤOTURJE, Ruslando]

Anoncetoj Informoj Korespondu!

Ĉiu kadro kostas 10 rublojn por rusianoj aŭ 2 IRK por eksterlandanoj. Por abonantoj de "K" - senpage.


f-ino *Nayyereh Ebrahimpur*
20 jaroj, deziras
korespondi tutmonde
P.O. kesto: 13345-363
Tehran
Irano

Atenton! En K-6 okazis
erareto, ni korektas la adreson
Koreaj esperantistoj
novbakitaj volas
korespondi kun
nekoreaj samideanoj
Lee Jungkee
esperant@unitel.co.kr.

En norda Ruslanda
marhavena urbo funk-
cias E-klubo kaj E-
kursoj por plenkreskuloj
kaj lernejanaj aparte. Ni
serĉas korespon-
damikojn.
La unuajn leterojn bon-
volu sendi laŭ la adreso
de la kursgvidanto

Aleksas Masiukas
pr. Lenina, 101-26
MURMANSK
RU-183012
Ruslando
masiukas@mail.ru

s-ino *Julia Perc*
korespondi tutmonde
Apartat de Correus
No. 155 ES-07080
PALMA DE
MALLORCA
Islas Balears
Hispanio



Kornjuŝina Anna S. [SUZUN, Ruslando]

f-ino *Samira Gholami*
19 jaroj, deziras
korespondi tutmonde
No: 8/1, Kh: Shahin,
Kh: gaemmagham Farahani,
IR-1585894753
Tehran
Irano

Ivan Solomonov
16 jara fraŭlo, korespondi
tutmonde pri ĉiuj temoj
Molodejnaja, 4-1
KIZNER,
Udmurtio,
427708,
Ruslando

Araraquara E-klubo
serĉas korespondamikojn
por siaj membroj
Rua Carlos Gomez 3475
Santa Angelina
BR-14802-165
ARARAQUARA - SP
Brazilo

Esperanto-klubo
13-jaraj esperantistoj
korespondi kun samaĝuloj
tutmonde
College Louis Pasteur
48 Paul Claudel
FR-13009 Marseille
Francio

8 komencantoj
diversaĝuloj, deziras
korespondi tutmonde pri ĉiuj
temoj, individue aŭ grupe.
Esperanto-kurso, Prof. Ari,
Alagoana Asocio de E-to, C.
P. 396, Maceio AL,
BR — 57020-970
Brazilo

KOMENCANTO 2002

16 paĝoj
kolora kovrilo
famaj esperantistoj
historio de E-literaturo
gramatiko serioze kaj ŝerce
amuzaj rakontoj
proverboj, aforismoj
anekdotoj
adreso
multaj multaj bildoj

Por aboni "K"-n kontaktu vian landan peranton

UEA-konto "VKUD-A"

eblos abonpagi rekte al la redakcio per monbiletoj aŭ IRK — kondiĉoj sur la paĝo 2

